

- 1 -

Dum duonjarcento, la burĝinoj de Pont-l'Évêque enviis al S-ino Albino ŝian servistinon Feliksan.

Por cent frankoj jare, ŝi kuiris, ordigis, kudris, lavis, gladis, scipovis jungi ĉevalon, grasigi kortobirdojn, batadi buteron, kaj restis fidela al sia mastrino — kiu tamen ne estis agrabla homo.

Ŝi estis edziniĝinta kun senriĉaĵa bela knabo, mortinta en la komenco de 1809, lasinte al ŝi du tre junajn infanojn kaj amason da ŝuldoj. Tiam ŝi vendis siajn proprietaĵojn, krom la bieno de Toucques kaj la bieno de Geffosses, kies rentoj enspezigis al ŝi apenaŭ 5000 frankojn, kaj ŝi forlasis sian domon de Saint-Melaine por enloĝiĝi en iun malpli elspezigan, kiu estis aparteninta al ŝiaj prauloj kaj situanta malantaŭ la halo.

Tiu domo, tegolita de ardezo, troviĝis inter pasejo kaj strateto finiĝanta ĉe la rivero. Ĝi havis interne nivelodiferencojn kiuj stumbligis. Mallarĝa vestiblo disigis la kuirejon el la ĉambro, kie S-ino Albino restadis la tutan tagon, sidanta ĉe la ŝprosfenestro en pajla brakseĝo. Kontraŭ la mura surtabulaĵo, blanke farbita, viciĝis ok mahagonaj seĝoj. Malnova piano subportis, sub barometro, piramidan amason de skatoloj kaj paketoj. Du tapiŝitaj foteloj flankis kamenon el flava marmoro en stilo Ludoviko la 15-a. Meze, horloĝo prezentis templon de Vesto, kaj la tuta apartamento odoris mucidete, ĉar la planko estis malpli alta ol la ĝardeno.

En la unua etaĝo, antaŭ ĉio estis la dormoĉambro de “*Sinjinorino*”, grandega, tapetita de surpaperaj helaj floroj, kaj havanta portreton de “*Sinjinoro*” en vestaĵoj de postrevolucia elegantulo. Ĝi interligiĝis kun pli malgranda dormoĉambro, kie videblis du senmatracaj porinfanaj kuŝejoj. Sekve troviĝis la salono, ĉiam fermita, kaj plena de mebloj kovritaj per drapo. Poste koridoro kondukis al studkabineto. Libroj kaj paperaĵoj plenigis la bretojn de libroŝranko, kiu triflanke ĉirkaŭis larĝan skribotablon el nigra ligno. Du paneloj estis kaŝitaj de plumaj desegnaĵoj, gusaĵaj pejzaĝoj kaj gravuraĵoj de Audran<sup>1</sup>, memoraĵoj de pli bona epoko kaj sveninta lukso. Luko en la dua etaĝo lumigis la dormoĉambron de Feliksa, kun vidaĵo al paŝtejoj.

1 Nomo de longdaŭra fama gravurista familio, de Charles Audran (1594-1674) ĝis Prosper Gabriel Audran (1744-1819). Flaubert ne precizigas pri kiu el ili temas, verŝajne la lasta.

Ŝi ellitiĝis tuj ĉe la ektagiĝo, por ne maltrafi meson, kaj laboris senpaŭze ĝis la vespero. Post la vespermanĝo, la manĝilaroj aranĝitaj, kaj la pordo bone fermita, ŝi enŝovis ŝtipon sub la cindrojn kaj endormiĝis antaŭ la fajrejo kun sia rozario en mano. Neniu marĉandante montriĝis pli obstina. Pri pureco, la brilo de ŝiaj kaseroloj igis la aliajn servistinojn senesperaj. Ŝparema, ŝi malrapide manĝis, kaj plukis per siaj fingroj de sur la tablo la paneretojn, el pano pezanta dek du funtojn, aparte kuirita por ŝi, kaj kiu daŭris dudek tagojn.

En ĉiuj sezonoj ŝi portis indienan tukon fiksitan ĉedorse per pinglo, kufon kaŝantan ŝian hararon, grizajn ŝtrumpojn, ruĝan subjupon kaj super ŝia kamizolo antaŭtukon kun brustopeco, kiel la hospitalaj flegistinoj.

Ŝia vizaĝo estis maldika kaj ŝia voĉo akuta. Je dudek jaroj, oni taksis ŝin kvardekjara. Post kvindek jaroj, ŝi ne plu havis ian ajn aĝon. Kaj ĉiam silenta, kun rekta talio kaj moderaj gestoj, ŝi ŝajnis ligna virino aŭtomate funkcianta.

## - 2 -

Ŝi estis havinta, same kiel ĉiuj, sian amaferon.

Ŝia patro, masonisto, mortis falinte de skafaldo. Poste ŝia patrino mortis, ŝiaj fratinoj disiĝis, farmisto akceptis ŝin, kaj dungis la etulinon por gardado de bovinoj en la kamparo. Ŝi frostotremetis sub ĉifonaĵoj, trinkis surventre la akvon de flakoj, estis batita pro neniaĵoj, kaj fine estis forpelita pro ŝtelo de tridek soldoj, kiun ŝi ne estis farinta. Ŝi dungiĝis en alia bieno, iĝis kortobirda prizorganto, kaj ŝiaj kamaradoj ĵaluzis ŝin, ĉar ŝi plaĉis al la mastroj.

Aŭgustan vesperon (ŝi tiam estis dek ok jara), ili kuntrenis ŝin en la komunuman feston de Colleville. Tuj ŝi estis konfuzita, mirkonsternita de la bruego de la dancmuzikistoj, la lumoj en la arboj, la bunteco de vestaĵoj, la puntaĵoj, la oraj krucetoj, tiu homamaso samtempe saltanta. Ŝi estis modeste flankenstaranta, kiam junulo ŝajne riĉa, kiu fumis sian pipon kun la kubutoj sur la timono de ŝarĝoĉaro venis por inviti ŝin al dancado. Li pagis cidron, kafon, platkukon, kaptukon, kaj pensante, ke ŝi komprenis lin, proponis elakompani ŝin. Ĉe la rando de avena kampo, li krude renversis ŝin. Ŝi terurigiĝis kaj ekkriis. Li forkuris.

Alian vesperon, sur la ŝoseo al Beaumont, ŝi volis preterpasi grandan ĉaron de fojno, kiu malrapide iris, kaj apudante la radojn ŝi rekonis Teodoron.

Li aliris ŝin trankvilmiene, kaj diris, ke necesas pardoni lin, ĉar “kulpis drinkado”.

Ŝi ne sciis kion respondi kaj emis fuĝi.

Tuj poste li parolis pri rikoltoj kaj pri la gravuloj de la municipo, ĉar lia patro estis forlasinta Colleville-on por la bieno de La Ŝtipoj, tial nun ili iĝis najbaroj. “Aha!”, ŝi diris. Li plu diris, ke oni volis edzigi lin. Nu, li ne volis rapidi, kaj atendis virinon laŭ sia gusto. Ŝi klinis sian kapon. Tiam, li demandis ĉu ŝi pensas pri edziĝo. Ŝi ridetante respondis, ke moki ŝin estas malafable. “Sed ne, mi ĵuras!”, kaj per sia maldekstra brako prenis ŝian talion. Ŝi marŝis subtenata de lia stringo, ili malrapidiĝis. La vento milde blovetis, la steloj brilis, la giganta fojnamaso balanciĝis antaŭ ili, kaj la kvar ĉevaloj trenantaj siajn paŝojn levis polvon.

Kaj jen, senaverte ili turniĝis dekstren. Li ankoraŭfoje brakumis ŝin. Ŝi malaperis en la malhelo.

La sekvantan semajnon Teodoro akiris rendevuojn de ŝi.